

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Vi aŭdas prelegaron de Charles Ecabert pri la svisa edukisto Henriko Pestalozzi.

A.- « Nediskuteble la vokiĝo de Pestalozzi estis eduki. Li naskiĝis edukisto, la profunda emo de lia naturo lin portis al edukado, precipe pri la malplej favorataj infanoj, kiujn li volis eduki al vera humaneco. En la jam citita verko *Noktlaboroj de solulo* Pestalozzi diras :

Cl.- « *Kiu ne estas homeca, kiu ne estas edukita en sia koro al homeco, malhavas bazon por sia estonta destino kaj aparta pozicio.* »

A.- Tamen tiu denatura edukisto, dum tuta periodo, inter la tridekkvina kaj la kvindeka aĝjaroj, ŝajne la plej efikaj el la homa ekzisto, ne plu kontaktiĝis kun la infana mondo.

Cl.- « *Oni pensas, notas Malche, historiisto pri Pestalozzi, al ŝtono ruligita en la ŝaŭmo de torento. Ĝi ĉirkaŭiras kaj eluziĝas je la flankoj de glata baseno, el kie ĝi ne plu povas eliri, kaj iun pluvegan tagon ĝi estas forĵetata el tiu longdaŭra malliberejo.* »

A.- Tiujn jarojn kvazaŭ marĝenajn al lia vera destino, de 1780 ĝis 1798, ni ekzamenos hodiaŭ.

Cl.- Dum preskaŭ 20 jaroj li ŝajne vagas, pensante, meditante, amasigante spertojn, serĉante sin mem. Antikva Eŭropo dum tiu tempo ruiniĝas ; la granda revolucio forbalaas ĉion. Malnova Svislando estas invadita. Enlanda milito furiozas.

A.- En 1782 Pestalozzi eldonas ĉiun ĵaŭdon ĵurnaleton destinitan « *al la popolo kaj ĝiaj paŝtistoj: La Svisa Gazeto.* »

Cl.- Rilatoj inter homo kaj socio, moralaj konsekvencoj de mekanika industrio, reformo de la malliberejoj, kiuj devus iĝi lernejoj por la devojĝinta homaro, tiaj estas la ĉefaj pritraktitaj temoj.

A.- Kontraŭ Rousseau Pestalozzi asertas la neceson individuigi la edukon.

Cl.- « *Se mi korespondus kun 20 patroj, li diris, mi konsilus al ili 20 diversajn edukmanierojn.* »

A.- En 1792 li kompletigas la verkon *Leonardo kaj Gertruda*. En la malliberejo la subvokto Hummel pentas, sed siavice liaj juĝintoj ne restas ŝirmataj kontraŭ memriproĉoj, ĉar ili koncentrigis la atenton de tuta popolo sur la malbono. La homa egoismo estas esenca kaj ne eblas ion abrupte ŝanĝi.

Cl.- « *Se ĉio status bone, Pestalozzi konfesas, la homaro ne povus tion toleri.* »

A.- Eksplodas la franca revolucio kun siaj sangoplenaj ekcesoj. Multe suferas Pestalozzi, kiu deklaras :

Cl.- « *Dum mia tuta vivo mi ŝatis la emancipadon de la popolo; sed neniun pli firme ol mi iam konvinkiĝis, ke tiu emancipado estas ebla nur en la limoj de la publika ordo.* »

A.- La 26-an de aŭgusto 1792 dekreto de la franca leĝdona Asembleo donas al Pestalozzi la titolon de franca civitano, same kiel al Bentham, Washington, Schiller, Klopstock kaj aliaj nefrancoj,

Cl.- « *kiuj, laŭ la oficiala teksto, per siaj skribaĵoj aŭ kuraĝo, servis la kaŭzon de la libero kaj preparis la malsklavigon de la popolo.* »

A.- Por montri sian ŝuldatecon Pestalozzi skribis verketon titolitan *Jes aŭ ne !* Ĝi estas sagaca analizo de la revoluciaj kaŭzoj kaj averto al la princoj :

Cl.- « *Ne estas meza eblo, aŭ Eŭropo enabismiĝos en barbarecon pro despotismo, aŭ la estraroj devos lojale koncedi tion, kio estas laŭleĝa en la homaj sopiroj al la libero.* »

A.- Tiun liberon li baldaŭ difinas :

Cl.- « *Regnana libero nenio alia estas ol sekureco de la homaj rajtoj en socia stato.* »

A.- En 1793 li instalas sin en idilia pejzaĝo : Richterswil, kie lin vizitas la fama germana filozofo Fichte, la artkritikisto Ferdow kaj la dana poeto Beggesen, kiu lin jene portretis :

Cl.- « *Pestalozzi estas homo kvar- aŭ kvindek-jara, malbela je vizaĝo kaj stampita pro variolo, simpla kiel kamparano en siaj vestoj kaj eksteriĝo, sed tiel bonkora kiel neniu. Krome kun bonega praktika filozofio !* »

A.- Oni tiam diskutis pri projekto de granda filozofia verko, en kiu Pestalozzi volis resumi siajn ideojn pri homo kaj naturo unuflanke, pri moralo kaj juro aliflanke. Tiu verko aperis inter 1795 kaj 1797 sub la titolo *Miaj esploroj pri irado de la naturo en la disvolviĝo de la homa specio*.

Cl.- En tiu libro kondensiĝas la saĝo de lia matura aĝo, kiel en la *Noktlaboroj de solulo* li resumis la idealon de sia junaĝo. Lia filozofio ne havas universalan karakteron sed strikte personan, ĝi estas esence dinamika. Li imagas la moralan mondon kiel perpetuajn agon kaj reagon. La homo partoprenas samtempe en tri statoj, kies ĉiu regas unu aĝon, ĉu en la individuoj, ĉu en la historio de la homaro. Homo estas kune fizika, socia kaj morala estaĵo. Ni iras el la **anomio**, rego de la instinktoj, al la **heteronomio**, regno de la devigo socia, por atingi la **aŭtonomion**, regno de la interna kaj persona leĝo. Homo estas samtempe besta, socia, dia, depende de sia klopodo.

A.- Sed kio regas en la homo, estas idealo pri perfekto, la volo per kiu ni levas nin el la pura instinkto al oboe je grupo, poste al morala libero.

Cl.- « *Homo, diras Pestalozzi, faras el tio, kion li devas, leĝon de tio, kion li volas.* »

A.- Kiam estis proklamita la Helvetia Respubliko unueca kaj nedividita en 1798, la politikaj ĉefoj Rengger, Legrand kaj precipe Stapfer, kiuj estis liaj amikoj aŭ konatoj, komisiis al li la ŝarĝon krei ĵurnalon por plialtigi la publikan menson antaŭ ĉio en la kamparo. Pestalozzi estis nomita redaktoro de la *Popola Helvetia Gazeto*.

Cl.- Por la unua fojo li alprenis oficialan postenon, kiun li plenumis nur 67 tagojn. Li tute ne havis funkciulan animon.

A.- Al Legrand, kiu faris al li oferton, li respondis :

Cl.- « *Mi volas esti instruisto.* »

A.- Vi aŭdis prelegon de Charles Ecabert.

Cl.- Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-